

Novaĵoj Tamtamas

Internacia Gazeto de Esperanto Jokohama (Hama-Rondo)

エスペラントよこはまのエスペラント文会報

EL NIA MUZEO

Telefono instalita

Ni instalis poŝtelefonon (fakte, iPhone) en la muzeo; la numero estas: 070-1403-1859, aŭ por internacia voko, +81-70-1403-1859.




Kiom da libroj?

Je la fino de junio, 8236 dokumentoj (libroj, gazetoj ktp) estis registritaj en datumbazon, el kiuj pli ol duono konsistas el gazetoj. Restas ankoraŭ dudekoj da kartonoj plenŝtopitaj de dokumentoj, kiuj atendas katalogigon.

Kolekto pri atombombado – damaĝo kaj kontraŭa movado

En aŭgusto 1945, la du unuaj kaj ununuraj atombomboj trafis Urbojn Hirosima kaj Nagasaki, kaj de tiam multaj libroj aperis por raporti la damaĝon de la bomboj kaj por apeli movadon kontraŭ nuklea armado. Entute 43 libroj, t.e. preskaŭ ĉiuj el ili estis kolektitaj de s-ro Osioka Moritaka loĝanta en Hirosima, kaj ili estis donacitaj al nia muzeo.

Laŭ la intenco de s-ro Osioka, ili estos ekspoziciataj okaze de la 108a Japana Esperanto-Kongreso en Hirosima, kaj poste estos transdonitaj al ni. Sed la kongreso okazos nur rete en la pandemia cirkonstanco, tial ni ricevis la librojn anticipe, kaj esperas ekspozicii ilin rete en la Kongreso.



Eseoj

Jen la objekto

Mizro Iwaya

Ŝooĵi Sadao, japana mangaisto, skribis en iu semajna gazeto. “Kiam mi mendis bifstekon en iu altklasa restoracio, la kelnero portis la kuirotan viandon antaŭ min kaj, ĝin montrante, diris ‘jen la objekto ... (これになります)’ Stranga kutimo! Ĉu tio estas bona komplezo al gastoj? Ne-kuirita viando estas nur malbela kaj malagrabla objekto. Mi ne estas leono!” Mi komprenas lian opinionon kaj rememoris la kutimon en Koreio kaj Ĉinio.

Kiam mi promenis sur la strato en iu prospera kvartalo en Koreio, mi ofte vidis akvujojn kun fiŝoj antaŭ manĝejoj. Ĝi estas montrofenestro de la manĝejo. Kiam mi eniris en ĝin kaj mendis ian fiŝaĵon, la kelnero kaptis fiŝon per fiŝreto kaj montris ĝin al mi dirante “jen la objekto ... (여기요)”. Mi neniam vidis tiun kiu rifuzis la montritan materialon, same kiel montritan vinon de gustumado. Mi ne spertis samon en Ĉinio, sed mi vidis en Ju-tubo ke oni faras samon en ĉina restoracio.

Al mi ŝajnas ke la antaŭmontro de la kuirota materialo estas rigardata kiel pli alta komplezo. Lastatempe mi ofte spertas en altnivela restoracio ke la kelnero klarigas la enhavon de servata kuirajo. Fakte konciza klarigo helpas nin gustumi

la kuirajojn. Sed se ĝi estas longa, ĝi ne utilas, sed pli ĝenas nin. Do se temas pri malgranda fiŝo, la antaŭmontro iom helpas nin gustumi la kuirajojn. Sed se temas pri granda fiŝo aŭ peco da viando, tia montrado ne helpas, sed pli ĝenas nin.

Mi spertis plian komplezon en Koreio. Mi kaj korea gvidanto iris al alta konstruaĵo en Busano. Ĝi havis naŭ etaĝojn kaj onidire estas nomata “*susibiru* (konstruaĵo de suŝioj)”. La unua etaĝo, teretaĝo, estis ekspoziciejo kie estis aranĝitaj multaj basenoj. Laŭ mia memoro la basenoj estis sume ok. Fiŝoj naĝis en ili. Kiam ni elektis unu basenon inter ili kaj elektis iun fiŝon en ĝi, la vendisto diris al ni iri al certa etaĝo (laŭ la baseno) kaj atendi tie. Kiam ni atendis sur la montrita seĝo, oni portis kuiritan fiŝaĵon al nia tablo. Ĝi devas esti rezulto de nia elektita fiŝo. Tio estas fina komplezo en Koreio! Ĉu tia maniero vastiĝos ankaŭ en Japanio?

Se ni kutimiĝas al certa komplezo, oni devas elpensi novan komplezon. Senfina ciklo konsumas nin!

Baldaŭ aperos Eroŝenko-libro japanlingva

Sibayama Zyun’iti

Baldaŭ, okaze de la Kansaja Kongreso en la fino de julio, aperos de KLEG japanlingva libro de Vasilij Eroŝenko, kies titolo estos “Siberiaj rakontoj de Eroŝenko” (エロシエンコのシベリア物語). Fakte ĝi estas la japanlingva traduko de unu el la Eroŝenko-serio esperantlingve eldonita de KLEG, nome de “La tundro ĝemas” en kiu aperas 3 originalaj esperantlingvaj rakontoj: “Ĉukêa Elegio”, “Blindaj ĉukêoj” kaj “La trimova ŝakproblemo” plus biografieto pri Eroŝenko fare de Mine Yositaka.

Nu, kial tia ĉi libro estos eldonita? Preskaŭ ĉiuj esperantlingvaj rakontoj estis tradukitaj

japanen de Takasugi Ichiro, kaj dika volumo aperis de Misuzu Syoboo en 1970-aj jaroj. Sed tiam, ankoraŭ la esperanta originalo de “La trimova ŝakproblemo” ne estis vaste konata — ja ĝi aperis nur brajle. Tial Takasugi ne povis legi la rakonton, kvankam li sciis ties ekziston. En 1980, Mine sukcesis presi ĝin.

Pasis jaroj, kaj ni, ĉefe s-ro Hikita Akio, s-ino Murata Kazuyo kaj mi, havis okazon eldoni esearon omaĝe al la 125-jariĝo de Eroŝenko, kaj en tiu agado ni konatiĝis kun s-ino Tanaka Yasuko, filino de Takasugi Ichiro. Lastatempe, ŝi trovis manskribitan tradukon de tiu “La trimova

ŝakproblemo”, kaj ŝi unue klopodis aperigi ĝin de komerca eldonejo Misuzu Syoboo aŭ alia, sed malsukcesis. Sciinte tion, ni kontaktis KLEG, ke ĝi eldonu la japanlingvan rakonton, kune kun aliaj rakontoj jam japanigitaj kaj eldonitaj. Unue ni proponis al KLEG 2-lingvan, paralele legeblan eldonaĵon, sed KLEG diris “ne”, ĉar ankoraŭ la pure esperantlingva “La tundro ĝemas” estas stokita (40 jarojn post eldonado!). Fine ni konsentis, ke KLEG eldonos pure japanlingvan libron. Por tio, la unua afero estas fari tajpitan manuskripton de la manskribaĵo de s-ro Takasugi. Krome ni deziris, ke aperos japanlingva traduko de la biografio, do tiun japanigon faris s-ino

Murata. Feliĉe ni povis akiri de s-ino Tanaka, eseon pri ŝia patro Takasugi Ichiro.

En la lasta aprilo, ni aldonis manuskripton, kiu amendas la biografion faritan de Mine, ĉar ĝi malmulte priskribis, kiel vivis Eroŝenko post la vojaĝo al Siberio. Kelkaj faktoj aperis en la esearo redaktita de ni, sekve ni provizis detaleton, ekzemple en kiu jaro Eroŝenko iris al Turkmenio, ktp.

La fakto, ke Eroŝenko en 1938, la trian lokon en tut-rusia blindula ŝakturniro, donas realisman fonon al la ŝakludado de blindulo, en la rakonto “La trimova ŝakproblemo”.

JOKOHAMO PLI NOVA (2)

Kio novas post nia “Gvidlibro pri Jokohamo, kun Eseoj Hamalogiaj, 2017”?

Telfero super parko en Minato-Mirai

Se oni fotas la saman angulon de la foto en p.101 de la Gvidlibro, oni trovas kablun, kablofoston (plejalta je 40m) kaj kelkaj telferoj iro-revenantaj. Temas pri “Yokohama Air Cabin”, telfero liganta la fervojan stacion Sakuragicho kaj la Nov-havenan Kajon (Shinkoo-hutoo) en 5 minutoj da rajdo en telfera ĉambro por maksimume 8 pasaĝeroj.

Oni ja povis kaj eĉ nun povas iri preskaŭ paralele per piedo, sur vojeto nomata “Fervoj-Vojo”, ĉar iam la saman vojon iradis vagonaroj, sed nun nur piedirantoj. Tial oni povas ĝui irvojon super vojo kaj revenvojon sur vojo, aŭ inverse. Sed ĉu oni pagos mil enojn por tiu veturado? (Per tiom da mono, oni povas veturi 50 km sur fervojo...)

(SZ)



la telfero rigardata de sakuragicho



el la telfero oni rigardas la stacion Nov-havena Kajo

en VK, la muzeo estis prezentita

La 17an de julio komenciĝis la 2a Virtuala Kongreso (anstataŭ la UK en Belfasto), kaj en la 18a, je 16:00-18:00 japanempe, okazis la “Tago de Azio kaj Oceanio” (TAO). En ĝi estis prezentado de Esperanto-movado en aziaj kaj oceaniaj landoj. Kadre de Japanio, per s-ino Kitagawa Ikuko oni montris kelkajn scenojn, ekzemple de Esperanto-Domo de Jacugatake, la venonta (interreta) Japana Esperanto-Kongreso. Ankaŭ nia Esperanto-Muzeo Jokohama estis prezentita per du folioj (kun 4 fotoj), 2-minute.



eĥoj tutmondaj

el Pollando

Pola retradio raportis pri ni en “el la esperanta gazetaro”, en la 5a de julio kiel jene:

Ni ne forlasu Japanion, ĉifoje por enrigardi la aprilan numeron de la elektronika “Novajoj Tamtamas”. La ĉefa temo de la 4-paĝa informilo estas la inaŭgurita la 25-an de aprilo E-Muzeo Jokohama. La unuapaĝa teksto “Muzeo en preparo” proksimigas la anticipe faritajn laborojn kaj kolekton de la donacoj en la formo de libroj kaj dokumentoj. Tuj sekve Murata Kazuyo skribas pri sia volontula laboro en la muzeo konsistanta en la listigo de la enhavo de trideko da skatolegoj, venintaj al la muzeo, de Gotoo Hitosi kun dokumentoj kolektitaj de li, Shibata Iwao kaj Mine Yositaka por la “Biografia Leksikono de la E-Movado en Japanio”.

Iom pli frue ol venis la numero kelkajn fotojn kaj informojn pri tiu ĉi grava evento en Jokohamo mi trovis fejsbuke. La vekitan scivolemon bone kompletigis la veninta gazeto. Krome, la aprila numero de “Novajoj Tamtamas” reference al la decembra 120-a Legokunsido mallonge recenzas la kompilitan verkon de AIDA Kiyoshi “Tradukaĵoj de Japanaj

Beletraĵoj”, dum fine AIDA Yayoi en la emfaza teksto “Sopiro al Uzbekio” memorigas grupan vojaĝon faritan en 2005 al ĉi tiu lando.

el Ĉinio

Pli frue ol ni, fondita estis Esperanto-muzeo en Ĉinio. Ties respondeculo Semio sendis al ni mesaĝon.

karaj: Mi legis la informon, ke via Esperanto-Muzeo funkcias en Jokohamo. Mi gratulas vin en la nomo de la Esperanto-muzeo de Zaozhuang-a Universitato. Mi esperas, ke ni du muzeoj povos regule kontakti por interŝanĝi la informon kaj duoblajn kolektaĵojn.

sincere via

Semio (孙明孝)

